

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

london, la 4-an de Julio, 2016 • numero sep

Venu por muziko kaj artfajraĵoj!

Hodiaŭ estas la 4-a de Julio, datreveno de la usona sendependiĝo kaj tutlanda ferio kiam oni iras eksteren por ĝui paradojn, ludojn, konkursojn, krad-rostitajn manĝaĵojn, kaj pli.

En la urbocentro de Raleigh okazos pluraj senpagaj eventoj dum la posttagmezo kaj vespero: koncertoj, ludoj, ktp. Homoj eĉ konkursoj pri elsputado de akvomelonaj semoj. (Jes, vere!)

Je la 3-a ptm ni promenos de nia loĝejo al kelkaj muzeoj ene de kelk-minuta promeno. Vi rajtas eniri la muzeojn senpage, aŭ resti ekstere por ĝui la stratfeston, laŭ via plaĉo.

La muzeo de natur-sciencoj havas plurajn ekspoziciojn pri biologio, ekologio, geologio, marscienco, ks., kaj ankaŭ specialajn portempajn ekspoziciojn.

La nordkarolina muzeo de historio prezentas informon pri la pratempaj indiĝenoj, la alveno de eŭropanoj, la enlanda milito, la luktoj por homaj rajtoj, kaj multe pli. **Proksime estas ankaŭ la ŝtadomo de Norda Karolino.**

Se vi volas resti en la urbo por vespermanĝi, tute en ordo. **Por tiuj, kiuj tamen preferas reveni al la universitato por vespermanĝi, Hoss denove gvidos grupon de nia dormejo al la urbocentro je 8:15 ptm.** La urba registaro prezentos artfajraĵojn je 9:30 ptm, do ni sendube restos en la urbo ĝis almenaŭ 10:00 ptm.



Kio okazos hodiaŭ?

★7:30 – 8:15 atm
matenmanĝo
Belk Dining Hall

★8:30 – 12:15 ptm
lecionoj
Flowe

★12:30 – 1:15 ptm
tagmanĝo
Belk Dining Hall

★2:00 — 2:45 ptm
Ismary Lezcano GARCIA
La Ruĝa Kruco kaj Esperanto
Flowe

★3:00 — 5:30 ptm
Promeno al muzeoj
Renkontiĝu en nia dormejo, je la unua etaĝo. Ni piediros al muzeoj en la urbocentro.

★5:45 — 6:30 ptm
vespermanĝo
Belk Dining Hall

★8:15 – 10:30? ptm
Dua ekskurso al Raleigh por vidi artfajraĵojn. Renkontiĝu en nia dormejo, je la 1-a etaĝo.



La tuta kalendaro troviĝas sur blanka tabulo en la unua etaĝo de nia dormejo.

La NASKa Fasko estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Portu kontribuajojn (artikolojn, poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn, amleterojn, ktp.) al la redaktoro en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al <nask.esperanto@gmail.com>.



Nesto-kesta ovo-malkovro

de Ellen EDDY

Mi hazarde trovis la supran birdoneston en nekutima loko proksima al nia dormejo. Ĉu vi povas diveni, kie ĝi estas?

Klavaroj por Esperanto

de Derek ROFF

Ekzistas diversaj manieroj tajpi la ĉapelitajn literojn de Esperanto per komputilo. Iuj bezonas apartan programon, aliaj baziĝas pri plurciferaj kodoj, kaj kelkaj uzas virtualajn klavarojn.

Kompreneble, ĉio dependas de la elektita komputilo. Bona listo de la ebloj por pluraj komputiloj kaj poŝtelefonoj troviĝas en la retejo de la Novzelanda Esperanto-Asocio: <<http://goo.gl/Ve38Td>>.

Por Makintoŝo, mi pretas helpi. Tre efika kaj rapida sistemo por tajpi, kreita de Gary GRADY,

troviĝas en la retejo de la Amerika Asocio de Instruisto de Esperanto. <<http://goo.gl/T8Q4k5>>. Notu ke per tiu ligilo vi tuj komencos elŭti ZIP-dosieron. Malfermu la dosieron, kaj vi vidos dosieron “Legu-Min” kun instrukcio. Aŭ trovu min, kaj mi montros al vi kiel instalati kaj uzi la sistemon por Makintoŝo. Mi havas ankaŭ sistemon, se vi deziras tajpi laŭ la X-sistemo, kaj tamen aperigi verajn ĉapelitajn literojn.

Noto de la redaktoro: troviĝas ankaŭ en Vikipedio utilaj konsiloj pri kiel tajpi la Esperanto-supersignojn per la operaciumoj Windows, Macintosh, kaj GNU/Linux: <<http://goo.gl/xje4Tr>>.

Kviz-respondoj kaj demandoj

de Derek ROFF

Pri la prezidantoj, Abraham LINCOLN estis la unua Prezidanto el la Respublikana Partio. Ekde li, la Respublikanoj sukcesis en multaj elektoj. Nur du Prezidantoj


el alia partio elektiĝis dum la 72 jaroj, ekde Lincoln: Grover CLEVELAND, kiu deĵoris kiam la Unua Libro de Esperanto aperis, kaj Woodrow WILSON, ambaŭ de la Demokrata Partio.

Nova demando: Kio ĵetas pli da poluo kaj mineralaĵoj en la aeron dum unu tago? Ĉu granda, sed malofta erupcio de vulkano, ekzemple Mt. St. Helens, aŭ ĉu ĉiuj aŭtoj uzitaj en Usono dum unu tago?

Pli da vortludoj

de Zerbie

- Oni diras, ke estas lando nomita “Barato” en Azio, sed kiu baras ĝin?
- Ĉu granda grupo de helikopteroj estas helikopto?
- Mi vidis ŝian filinon; mi neniam pensis, ke lino povas estas tiom fia!
- Pri detruo mi ja scias, sed la demando estas: truo de kie?
- Hodiaŭ mi atingis superon, sed unu ero da supo ne estas multo.



Elizabeto demonstras unu el la plej komfortaj manieroj por digesti vespermanĝon — en hamako malantaŭ Belk Dining Hall. (Foto danke al Filipino.)